

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 23 Eberswalde 1990-09-24

1. **Raporto pri la kunveno de IFRE-anoj dum la Oka Sennacieca Universitata Sesio (SUS 8 en Białystok).**
 - 1.1. La jenaj IFREanoj alvenis al Białystok : L. Barbana kun partnerino, B. D. Marinov, K. Pacholczyk, J. A. Pachter, prof. d-ro H.D. Quednau, d-ro K.- H. Simon, I. Ullrich kaj nova IFRE-ano Miguel Alfaro Romero (Alberdi 270, 7100 DOLORES, Provincia Buenos Aires, Argentina).
En la prelegserio "Ekologio kaj protektado de la natura medio" partoprenis 24 personoj. Sekvaj prelegoj okazis:
 - I. Ullrich: Ekologia kontrolo de la arbara sanstato rilate novspecajn arbar-difektojn (NAD) kaj rezultoj en GDR.
 - K.- H. Simon: Deponaĵoj fare de atmosferaj precipitaĵoj en arbaroj en la norda Parto de GDR.
 - K. Pacholczyk: Bioindicoj de ŝanĝo en la naturmedio
 - J. A. Pachter voĉlegis prelegon preparitan de J. Werner: Rilatoj inter faka kaj nefaka leksikoj.
 - 1.2. Je la 16a de septembro 1990 la estraro kunsidis. Ĝi decidis pri la propono de la tagordo por la ĉefkunveno kaj pri la normoj de distingotaj IFREanoj.
"Protokolo de la ĉefkunveno Białystok 1990-09-17 Ĉeestintoj: L. Barbana, B.D.Marinov, K. Pacholczyk, J. A. Pachter, prof-o d-ro H.-D. Quednau, I. Simon, d-ro K.- H. Simon, I. Ullrich, krome du gastoj.
Malfermo de la ĉefkunveno fare de d-ro Simon.
 1. Distingo per la medalo, kreita okaza de la 150a datreveno de la naskiĝtago de la forstscienco en Eberswalde al: L. Barbana kaj K. Pacholczyk. I. Danilin, C. Knokkaert, M. Markheden, S. Panka, U. Ribers kaj T. Turza ricevos la distingon per poŝto. D-ro Simon krome disdonas al la ĉeestintaj IFREanoj bildaron pri Eberswalde .
Sekve li proponas la tagodon, ĝi estis unuanime aprobata.
 2. Kroniko de la IFRE = raporto de la estraro
La propono de kroniko – antaŭe estis disdonita - estis kompletigata per tri aldonajoj kaj aprobita de la ĉeestantoj.
D-ro Simon komisiis estraranon J. A. Pachter gvidi la pluan kunsidon.
 3. Statuto de IFRE
J. A. Pachter pritraktas la ebligon pretigi la statuton, samtempe disdonas al la ĉeestantoj la "statuton kaj ĝeneralan regularon de UEA" kaj la statuton de germana E-Asocio. J. A. Pachter proponas por IFRE statuton laŭ UEA-statuto, kiel sidejon de IFRE adreson de la prezidanto – Eberswalde -, sed ankaŭ ŝanĝebla fare de la estraro. La proponon ĉiuj akceptas. Celoj de IFRE restas tiel, kiel jam publikigitaj en diversaj FI. Prof-o Quednau proponas ŝanĝon de la nomo "IFRE", forstreki "Esperantlingva". La ĉeestantoj – krom la proponinto - malaprobas la proponon.
La IFRE-estraro – elektita de la membroj de IFRE – gvidas la IFRE-Asocion. La estraron gvidas la prezidanto – elektita de la IFRE-membroj. Organoj de la Asocio estas la membrar-kunveno kaj estraro. La estraro

konsistas el prezidanto, vic-prezidanto, sekretario kaj kasisto. Terminologia komisiono (TK) gvidas la terminologian laboron de IFRE. La membrar-kunveno elektas la estron de TK. Li ankaŭ povas aparteni al la IFRE-estraro.

La ĉeestantoj komisiis s-anon Pachter ĝis la fino de la nuna jaro prepari statut-proponon, kiu estas publiigota en FI. Sekve la membroj de IFRE havas tempon resendi la koncernajn opiniojn ĝis la 31a de marto 1991.

4. Balotado de IFRE-estraro
 - 4.1. Estas proponataj: D-ro Simon, J. A. Pachter; prof. Quednau (li rezignas).
Balotadrezulto: D-ro Simon 7 voĉoj, 1 sindetenanto
 - 4.2. Balotado de vicprezidanto
Estas proponataj: B. D. Marinov, K. Pacholczyk
Balotadrezulto: B. D. Marinov 7 voĉoj, 1 sindetenanto
 - 4.3. Balotado de sekretario
Estas proponataj: Inge Simon, K. Pacholczyk
Balotadrezulto: I. Simon 7 voĉoj, 1 sindetenanto
 - 4.4. Balotado de kasisto
Estas proponataj: J. A. Pachter; I. Ullrich
Balotadrezulto: J. A. Pachter 7 voĉoj, 1 sindetenanto
 - 4.5. Balotado de la estro de TK
Estas proponataj: I. Ullrich, B. D. Marinov
Balotadrezulto: I. Ullrich 7 voĉoj, 1 sindetenanto
5. Membreco ĉe UEA
Oni unuanime voĉdonas favore al la membreco ĉe UEA kiel fakasocio. La aliĝpeto estos farata post la aprobo de la statuto de IFRE post marto 1991.
6. Rilatoj al AIS kaj TEC
I. Ullrich kaj J. A. Pachter proponas kunlabor-konstrakton kun AIS, kongrue al statuto de AIS. Ĉiuj akceptas tion.
D-ro Simon kaj Pachter proponas firmigi la kunlabor-kontaktojn kun TEC.
D-ro Simon esploras la eblecon de kontrakto.
7. Redaktado de Forstista Informilo
La propono, ke IFRE eldonu propran bultenon "Forstista Informilo" (FI), estas subtenata unuanime. Kiel ĉefredaktoro deklaras sin preta d-ro Simon. Ĉiuj voĉdonas favore al d-ro Simon.
8. Informado kaj varbado interne de la E-movado: Responsulo K. Pacholczyk.
9. Ekskursoj dum ĉefkunvenoj
Oni akceptas la proponon de J. A. Pachter kompletigi ĉiun ĉefkunvenon per komuna ekskurso.

Protokolanto: L. Barbana

- 1.3. Je la 18a de septembro la ĉeestintaj IFREanoj veturis al Bialowieza. Tie salutis nin la estro de la tiea forstkantono, vicdirektoro de la Nacia Parko, kaj estis tuttage nia lerta cicerono. Li klarigis al ni la konstantan ekspozicion de la Nacia Parko. Poste ni vizitis la tiean sektion de la Varsovia Forsta Esplorinstituto (IBL). Ĝia estro, samtempe direktoro de la Nacia Parko, prof-o d-ro Sokolowski, salutis nin, kaj liaj kunlaborantoj informis nin pri kelkaj esplor-rezultoj kaj speciale pri la "technical monitoring" rilate ŝarĝon de la vivmedio. Ni ankaŭ vizitis la zooparkon kun eŭropaj bizonoj, alkoj, aproj kaj cervoj. Kelkajn horojn ni migris tra la totale protektita rezervejo. Neforgesebla travivaĵo.

1.4. Kunsidoj de IFRE-anoj rilate al la forst-terminologia laboro

1.4.1. La ordigo laŭ Oksford-sistemo

K.- H. Simon kaj I. Ullrich klarigis la proponon ordigi la terminoj surbaze de la Oksford-sistemo. La ĉeestintoj akceptis la sistemon por la interna terminologia laboro de IFRE.

1.4.2. Principoj de la terminologia laboro

I. Ullrich informis pri la principoj de nia terminologia laboro:

- a) Termino estu lingve korekta
- b) Termino konvenu laŭ la senco de nocio surbaze de difino
- c) Termino estu internacia, konciza, facile prononcebla; longaj vortkunmetaĵoj disigu per ligstrekoj
- d) Oni evitu esceptojn
- e) Oni evitu novajn vortradikojn

1.4.3. Stadio de la terminologia/vortara laboro

La MTK pritraktis dum la pasintaj monatoj la Esp.- lingvajn termino-proponojn kadre de la tuta sistemo de forstfakaj terminoj. Tiutempe la enhavo de slipoj estas kompletigata. Dum la sekvontaj monatoj komenciĝos la eldono de la .2-versio en la formo de koncernaj listoj por la unuopaj kunlaborantoj. Ili ankaŭ ricevos laŭalfabete ordigitajn test-listojn, por ke ili povas kontroli la korektecon de la laŭalfabeta ordigo de la terminoj/ekvivalentoj.

La stadio de prilaborado de la unuopaj lingvoj estas tre diversa. Ĝi estas normala por la jenaj lingvoj: de, fr, ru, bg, cs, sk, pl, sv, hu, no, it, nl, tr. Por "en" mankas gepatra(j) lingvulo(j). Tial ni petis d-ron Uhlig (germano) el la Tharandta altlernejo kontroli la anglan ekvivalentojn. Por "es" unufoje trarigardis H. Gra Rios la slipojn. Pro la uzado de "es" en kelkaj landoj kelkfoje ekzistas diversaj ekvivalentoj. Tial pluaj hispan-lingvanoj estas dezirindaj. Estonte M.A. Romero kunlaboros. La simila validas al la portugala, por kiu ĝis nun nur volas helpi E. L. Serejo. I. Sirbu el Brasov (Rumanio) klopodis helpe de anoj de la tiea forsta altlernejo kontribui al nia laboro kaj sendis pere de S. Oroszi la unuajn rezultojn. Kelkfoje ni vane provis trovi finlandanon por nia laboro. Rilate la "sh" ni korespondis kun forstistino en Jugoslavio, sed ĝis nun ne ricevis rezulton. Dum la lastaj monatoj vjetnama finstudento de la altlernejo Tharandt sendis nin la vi- ekvivalentojn de la unuaj 500 nocioj, Rilate la baltajn lingvojn speciale la latvan, ni plu esperas, ke J. Smildzinš el Riga, IFREano ekde la Varsovia Kongreso, povas helpi.

Pro la lingva kontrolo de la Esp.- terminaro deklaris sin preta akademiano d-ro E. Krause el Leipzig.

1.4.4. Diskuto pri terminologiaj problemoj

Okazis longdaŭraj disputoj pri ĝis nun ne sufiĉe solvitaj problemoj kaj pro terminoj, pri kiuj unuopaj kunlaborantoj ne estas kontentaj

- Ĉu oni preferu kunmetaĵojn ĉe la formado de terminoj – laŭ la ĝermanaj lingvoj – aŭ substantivon kun adjektivo – laŭ la slavaj kaj romaniaj lingvoj. Ĉar la kunmetaĵoj ofte estas pli mallongaj ol la aliaj, la plimulto de la MTK (nun TK) preferas tiun eblecon de la Esp.-lingvo. Ankaŭ la enhavo de "Forestry and Forest Products Vocabulary" de M. Ruokonen (1984) pruvas, ke ankaŭ en la angla faklingvo estas forta tendenco en la lastaj jaroj krei kunmetaĵojn. La TK ne troigas tiun vojon, proponis por ĉiuj formoj de proprieco rilate arbarojn la formon substantivo kun adjektivo ekz. "privata arbaro".
- Por terminoj rilate al difekto eblas diversaj formoj, ekz, "difekto pro insektoj", "difekto fare de insektoj", "proisekta difekto". La kunmetaĵo "insekto- difekto"

estas dusenca: Difekto pro insektoj kaj difekto de insektoj, tial ne uzebla. Ni proponas la terminon "proinsekta difekto". Sed ne ĉiam tiu sistemo estas oportuna. Ekzemple la difekto pro sundevena ŝelnevrozo ne nomu "prosundevenaŝelnevroza difekto".

- Kiel kompletaj sistemoj de terminoj, kiuj estiĝis realigante la terminologiajn principojn per diversaj kompromisoj, I. Ullrich prezentis la sistemon pri la fondo de arbaroj kaj la sistemon pri stadioj de arbareroj.
- Rezulte de la diskuto, la difino "faligflegi" (0082) = "durchforsten" estis precesigata. Ĉu la senco de nocio 1018 "fleg-faligado" = "Pflegehieb" diferencas de tiu de 0082, pri tio la ĉeestantoj ne atingis konsenton.

1.5. La ĉeestintoj dankis al la estraro kaj helpantoj = speciale J. A. Pachter de AIS pro la laboro rilate bonajn kondiĉojn de nia kunveno.

2. La venonta IUFRO- kongreso (jubilea kongreso) okazos en la jaro 1992 en Berlin kaj Eberswalde. La Eberswalde IFREanoj proponas, ke la venonta ĉef-kunveno de IFRE okazu lige kun la IUFRO-kongreso en Eberswalde.

KRONIKO DE LA "INTERNACIA FORTISTA RONDO ESPERANTILINGVA" (IFRE)

1. La periodo ĝis 1982-09-29

Verŝajne post la dua mondmilito la unuafoja prezentiĝo de Esperanto-forstistoj okazis dum la 1a konferenco "Apliko de Esperanto en la Scienco kaj Tehniko" (AEST) en Žilina (1981-08-14/17). Dum tiu ĉi konferenco prelegis M. Svoboda (ĈSSR) pri "La influo de aerpolucio al arboj kaj arbarkulturoj en ĈSSR" kaj K.- H. Simon (GDR) "Pri la bilancado de la akvo-budĝeto de unuopaj arbostokoj en la ebena regiono de GDR". M. Svoboda rakontis, ke li jam kelkajn jarojn klopodis pri kunlaboro de forstistoj sur la tereno de Esp.-lingvaj forstfakaj terminoj, sed vane. Li instigis, ke en Eberswalde oni komencu eldoni slipojn kun nocioj por komuna prilaborado.

Probable la apliko de Esperanto en la forstmastrumado kaj kunlaborado de Esp.-lingvaj arbaristoj/forstistoj estas deziro de esperantistoj delonge. ISAE tiam havis laŭprograme faksekcion de arbaristoj, sed fakte ĝi ne ekzistis. Keikaj naciaj Esperanto-asocioj posedas sciencajn kaj teknikajn komisionojn. En la jaro 1981 ne estis konate, ĉu iu ajn formis sekcion de forstistoj.

Komence de oktobro 1981 fondiĝis en Berlino kadre de la Esperanto-Asocio de GDR (GDREA) Scienca kaj Teknika Komisiono. Laŭ ĝia tasko tri Esperantistoj el la Instituto pri Forstosciencoj Eberswalde konsiliĝis pri sekvontaj paŝoj kaj ekagadis. Ekde tiam ekzistas bona kunlaborado surbaze de reciproka utilo kun la sekcio pri informado kaj biblioteko de tiu ĉi instituto. Ĉiuj rekomendoj de la sekretario de GDREA d-ro Blanke pri alvoko en diversaj Esp.-revuoj kaj informpeto ĉe R. Eichholz (Kanado), d-ro Kavka (Prah) kaj profesoro Neergaard (København) estis plenumitaj. La rezulto estis iom magra. R. Eichholz sendis antaŭan presaĵon de priforstaj paĝoj el la "Bilda Dudeno". Sed montriĝis, ke liaj forstistaj kunlaborantoj jam estis forpasintaj.

Ĉar jam en februaro 1982 kvar alilandanoj (M. Svoboda, ĈSSR; R. Hjorth, Svedio; S. Oroszi, Hungario; J. Sulżycki, Polando) estis deklarintaj siajn pretecon pri terminologia laboro, la eberswald-anoj komencis prepari tiun ĉi laboron kaj anoncis sin kiel fakgrupo en GDREA.

2. La periodo de 1982-09-30 ĝis 1984-08-30.

Je la 24a de decembro 1981 S. Maserov proponis “eldoni malgrandan bultenon por informadi kaj organize ligi la kolegojn”. Ĉar ankaŭ aliaj kolegaj subtenis similan ideon, ni preparis tian bultenon. La 30an de septembro 1982 ni eldonis la unuan numeron de “Forstista informilo”(FI). Ĝi enhavis la nomojn de 13 geforstistoj, kiuj deklaris sin preta kunlabori en terminologia laboro pri forstaj aferoj. Ni substrekis la ses tezojn de Wera Dehler (Blanke) pri terminologia laboro, kiuj konvenis al niaj propraj spertoj:

1. Terminologia laboro necesas
2. Nur la fakuloj mem kapablas fari tiun ĉi laboron.
3. La terminologia laboro devas esti organizata internacie kaj interfakte.
4. La terminologia laboro postulas multe da tempo kaj pacienco.
5. Tempo ne perdiĝu.
6. Racia labor-organizado necesas.

Intertempe firmiĝis la propono

- komenci nian agadon surbaze de la kvinlingva vortaro, eldonita de prof. d-ro J. Weck (Wörterbuch der Forstwirtschaft, BLV, München 1966)
- elekti la plej gravajn 2 – 3 mil nociojn el tiu vortaro
- verki multlingvan vortaron, ĉar la nombro de uzantoj tiel multobliĝus.

Kvankam tiutempe en Eberswalde ekzistis nur malmultaj kaj relative simplaj komputiloj, tamen estis klare, ke nur per tiaj modernaj teknikiloj ni povus fari la plurfojnajn multobligajn kaj ordigajn taskojn. Ĉar la disponeblaj komputiloj nur ebligis tajpi la literojn de la angia alfabeto, ni verkis kodon. Laŭ ĝi la diversaj diakritaj signoj kaj specialaj literoj estas indikataj per ciferoj antaŭ la koncernaj literoj. Tial ĉiu litero, ĉu majuskia ĉu mimuskla, estas unusignife fiksataj sur la trubendo. La FI No.1 enhavis la unuan kodoliston kun 16 numeroj. La kirilaj literoj estas antaŭe transliterataj laŭ normo 1362- 78 de Konsilantaro de Reciproka Ekonomia Helpe.

Tiam ni rezignis pri indiko de difino de nocioj kaj pri numero de Universala Decimale Klasifiko aŭ alia sistema envicigo. Neniu povis/volis preni sur sin tiun taskon, kiu propre estis solvenda antaŭ la diskuto pri Esperanto-formo de ĉiu termino. Do ni komencis la terminologian laboron, farante la duan paŝon antaŭ la unua. Ni opinilis, ke estus pli granda eraro ne komenci la komunan terminologian agadon, perdi tempon, perdi la pretajn kunlaborantojn. Plua atendado estus kaŭzintaj malesperon, inter kelkaj Esperanto-forsistoj, kiuj atendis vane terminologian laboron dum multaj jaroj. Do politikaj¹ kaŭzoj instigis nin tuj ekkomenci. Tiuj ĉi kaŭzoj dominis la kaŭzojn de la terminologia teorio. En la jaro 1982 komenciĝis la eldono de unuaj elektitaj nocioj, ĉiufoje sur unu slipo kun la ekvivalentoj en germana, angla, franca, hispana, rusa, bulgara, ĉeĥa, slovaka, pola, sveda, hungara, rumana, kaj finna lingvoj laŭ tio, kiel ili estis trovitaj en disponeblaj vortaroj.

En la Instituto pri Forstsciencoj Eberswalde ekzistas grandega faka biblioteko, sed ĝi ne enhavis PV, PIV, SV kaj STT kiel gravaj fontoj pri Esperanta terminologia laboro. Jam en la jaro 1983 J. A. Pachter sendis kiel donacon al la instituto ekzempleron de PIV kaj krome fotokopion de STT. Pli maltrue ankaŭ V. Kovaleva kaj Moudry helpis per vortaro-donacoj.

En novembro de la jaro 1982 ni komencis eldoni “Bibliografion de arbarmastrumada literaturo”. Ĝi entenas ĉiujn verkojn, kiujn terminologia laboro necesas aŭ traktas Esp.- lingve forstmastrumadajn aferojn.

La rezulto de multaj diskutoj kaj korespondadoj tiutempe estis la frazo en la unua numero de FI. “La oficiala formado de 'Internacia Fakgrupo de Esperanto-forstistoj' – eble en la kadro de ISAE aŭ ILASE aŭ en alla kadro – estas demando de estonto”.

¹ Politiko konsiderata kiel arto eltrovi la interesojn de plimulto kaj kiel oni povas uzi celtrafe la ekzistantan eblecojn

Estis multvalore, ke en decembro 1982 K.- H. Simon povis partopreni la internacian seminarion “Aktualaj problemoj de la scienc-teknika apliko de Esperanto” en Bad Saarow (GDR), kie prof. Neergaard, H.-P. Plehn, J. Werner k.a. klarigis problemojn de terminologia laboro.

Komence de la jaro 1983 K.- H. Simon instigis d-ron Blanke, ke li skribu leteron al la direktoro de la Instituto pri Forstsciencoj Eberswalde kun propono subteni la laboron de la Esp.-forstfaka grupo rilate al multlingva forstfaka vortaro en la intereso de reciproka profito. La direktoro ne konsentis, ĉar li ne kredis pri la sukceso de la esperantistoj kaj ne deziris tiurilatan evoluon de internaciaj kontaktoj. Malgraŭ tio la koncerna seccio-estro permesis plue uzi la organizad-aŭtomaton por prepari slipojn. Kiel adresulino por la kunlaborantoj el ne socialismaj landoj kunlaboris la Esp.-komencantino B. Engelmann.

Plua provo por ricevi publikan subtenon sukcesis, nome rilate al la forta Ĉambro de Tekniko en GDR. La Laboreja Sekcio en la Instituto pri Forstsciencoj Eberswalde akceptis la instigon de letero al la Instituto pri Plantprotektado, Sekcio Eberswalde pro helpo per moderna komputero-instalaĵo. La koncerna direktoro permesis la senkoston uzon de la I102F- instalaĵo. La duskipa movigita instalaĵo ebligis al la esperantistoj ĉiuvespere labori.

En marto 1983 dum la tradicia “Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1983” (IFER 83) kvar anoj de “forstista laborgrupo”- B. D. Marinov, K.- H. Simon, U. Steinert, I. Ullrich – konsiliĝis en Leipzig pri la pluan laboron kaj decidis, ke la nombro de nocioj de la unua eldono de vortaro estu limigita je unu mil nocioj, kiuj necesigus 6 – 7 jarojn por preparo kaj pluajn jarojn por kontrolo fare de aliaj kompententuloj kaj prepari la presadon. Dua decido estis la rezulto pri provo elekti konvenan Esp.-terminon laŭ demokratia decido. Tiu ĉi vojo ne estis ebla. Terminologia Komisiono – mallongigo TK – (pli frue Malgranda Terminologia Komisiono, mallongigo MTK) laŭfakte elektu el la proponoj la konvenan terminon. Kiel kunlaborantoj en tiu ĉi komisiono deklaris sian pretecon B. D. Marinov, K.- H. Simon kaj I. Ullrich. Pli malfrue I. Ullrich estiĝis estro de TK.)

La sekvanta kunveno de la laborgrupo dum la 68a UK en Budapeŝto je la 4a de aŭgusto 1983. Partoprenis A. Barasevich, R. Hjorth, S. Oroszi, J. Pachter, U. Steinert kaj I. Ullrich (vd. “Budapeŝta Informilo” 10/1983, p.7). J. A. Pachter i.a. proponis eldoni Eŭropan Forstistan Gazeton en Esperanto.

Inter la 5a kaj 10a de decembro 1983 rekondiĝis en Eberswalde S. Oroszi kaj A. Barasevich el Hungario kun la anoj de la forstista laborgrupo el GDR (I. kaj K.- H. Simon, U. Steinert, I. Ullrich, H. Weckwerth) por prepari la sekvantajn taskojn. – La partoprenintoj de la 68a UK raportis pri la kongreso ankaŭ en la tuta Eberswalde Esp.-grupo. – Oni decidis, ke la slipoj pri la terminoj enhavu estonte difinojn. Tio plibonigus la vortaran laboron. La ĉeestantoj konfirmis la proponitan agadsistemon de nia terminologia/vortara laboro (vd. FI n-ro. 5). Oni konsentis, ke estas tre grave apliki la forstan Esp.-terminaron kaj verki aŭ traduki priforstajn artikolojn. modelajn agadojn faris tiurilate I. Ullrich.

Fine de la jaro 1983 J. A. Pachter esploris la sorton de Esperanto-forstistoj, menciitaj en SCIENCA REVUO 61/1965. La rezulto: Neniu plu aktivis pro morto aŭ alta aĝo. Sed ili postlasis manuskripton “Forsta kaj ĉasa fakvortaro”.

3. La periodo de 1984-08-31 ĝis 1987-08-24

Okaze de la AEST `84 je la 31a de aŭgusto 1984 ok anoj de la internacia fakgrupo (B. D. Marinov, J. A. Pachter, I. kaj K.- H. Simon, U. Steinert, M. Svoboda, O. Vana) kaj aliaj interesuloj kunsidis en la sindikata klubo en Brno (ĈSSR). D-ro Simon raportis pri la pasinta agado de la Internacia Forstista Laborgrupo. La raporto enhavis tri esencajn punktojn.

- Terminologia/vortara laboro
- Verkado de Esp.-lingvaj artikoloj aŭ traduko de priforstaj artikoloj
- Partopreno en fakaj aranĝoj, kiel AEST, per prelegoj.

La terminologia laboro estis progresinta. En la 6a n-ro de FI ni anoncis la adresojn de 27 kunlaborantoj aŭ interesuloj pri la agadoj de la laborgrupo. Estis forsenditaj 327 numeroj de slipoj. I. Ullrich ĵus finis tradukon de ampleksa artikolo pri la forstaranĝado en GDR. Por la AEST- aranĝoj en 1982 kaj 1984 estis preparitaj prelegoj.

M. Svoboda proponis transdoni la termino-proponojn post prilaborado fare de TK al s-ro Pič (ĈSSR) kiel Esp.-lingvisto. – Tiu ĉi propono praktike ne estis realigata, ĉar ni intertempe ekkonis, ke nur post la ellaborado de la tuta sistemo de mil terminoj Esp.-lingvisto efektive povos kontroli la proponojn. La problemo de la konformeco de niaj nocioj kaj difinoj kun la “Multilingual Forestry Terminology” de IUFRO estis diskutata kaj la numeroj estu registrataj sur la slipoj paŝon post paŝo. Pri la kompletigo de la slipoj per anglalingvaj difinoj la negermanlingvanoj opiniis., ke krom la Esp.-lingvaj difinoj la germanaj sufiĉas, ĉar en la forstoscienco la germana lingvo ludas kaŭze de la historia evoluo specialan rolon.

La sekvinta renkonto de anoj de la forstista laborgrupo (J. A. Pachter, I. kaj K.- H. Simon, I. Ullrich) okazis dum IFER'85 inter la 8a kaj 10a de marto. J. A. Pachter raportis pri sukcesa serĉado kaj instigo de forstistoj por partopreni en la terminologia laboro. Tiel li povis varbi d-ron Ucar el la Istambula Forstscienca Fakultato kiel unuan ne-esperantiston, kiu sole responsas apartan lingvon. La kunlaborantoj de aliaj lingvoj plifortigis la klopodon apogi sin sur pliaj kompetentuloj. Nun estis forsenditaj 435 nocioj kaj preparita la unua listo de Esp.- termino-proponoj fare de la TK.

Okaze de la 70a UK de UEA en Augsburg kvin anoj de la forstista laborgrupo (A. Barasevich, Z. Glajcar, K. Pacholczyk, J. A. Pachter, prof. d-ro. H.D. Quednau) trifoje (1985-08-05/09) renkontiĝis kaj intensive konsiliĝis pri pliaj paŝoj en nia komuna tasko. J. A. Pachter gvidis la renkontiĝojn, kiujn partoprenis kelkaj interesitaj gastoj. La forstistoj donis al si mem la provizoran nomon “Internacia Forstista Laborgrupo Esperantlingva – IFLE”. Ĉiuj opiniis, ke estus grave baldaŭ oficialigi nian grupon, kaj ke estus plej bone starigi “Fakan Asocion” ĉe UEA. Longan tempon oni pridiskutis la skriban kontribuon por tiu ĉi kunveno de la laborgrupo fare de S. Maserov el Sofio “Kelkaj ideoj pri l'internacia kontaktado kaj scienc-praktika kunlaborado de l'esperantistoj- forstistoj” (vd. FI n-ro. 11). Oni konstatis, ke liaj ideoj estas ĝenerale tre interesaj, tamen parte jam realigitaj, parte nerealigeblaj nuntempe. Pliaj rezultoj estis: En ĉiu lando, kie estas tri kaj pli da forstistoj Esp.-lingvaj, oni formu landan forstistan sekcion. Forstistoj-esperantistoj klopodu organizi Esperanto- kursojn por forstistoj. Oni faru iasence “informilo-varbilon” t.e. FI kun nacilingva resumo helpanta varbi novajn homojn por nia laboro. IFLE-anoj proponis verki kune kun Asocio de Verduloj tekston de rezolucio pri ekologio, akceptita de la kongreso.

Inter la 14a kaj 16a de marto 1986 dum IFER '86 renkontiĝis en Leipzig I. kaj K.- H. Simon kun J. A. Pachter, kiu raportis pri partopreno kiel IFLE- membro en CIPRA-laborkonferenco pri arbarmortigo en Bad Schliersee. FRG (CIPRA = Commission Internationale pour la Protection des Régions Alpines). La ĉeestintoj akceptis la proponon de J. A. Pachter ŝanĝi la nomon de la Internacia Forstista Laborgrupo en “Internacia Forstista Rondo Esperantlingva”. La FI n-ro.13 unuafoje enhavis tiun ĉi nomon en sia kapo.

En aprilo 1986 komenĉigis la eldono de la .1-versio de la slipoj, do de la dua versio de la terminaro, kvankam la amplekso de la unua versio ankoraŭ ne atingis la celitan nombron. Tia paŝo rezultis el la multfoja interplektiĝo de disponeblaj komputiloj kaj materialoj. Por la Internacia Somera Esperanto Universitato 1986 (ISEU) en Veliko Târnovo, Bulgario, la TK preparis prelegon “Pri kelkaj spertoj, akiritaj dum la ellaborado de Esperanto-terminoj por la forstscienco”. Dum la ellaborado de la unuaj

360 terminoj la TK proponis akcepti ses novajn vortradikojn kaj pligrandigi la signifon de sep radikoj, kiujn enhavas jam PIV en aliaj sencoj. La prelego dum ISEU (1986-07-20/25) trovis atenton de la ĉeestintoj kiel la sekvinta diskuto pruvis. Inter la 1a kaj 5a de septembro 1986 la scienca kaj teknika komisiono de la ĉeĥa Esperanto-Asocio aranĝis en Roudnice terminologian kurson, dum kiu estis komunikataj bazaj terminologiaj scioj. B. D. Marinov kaj K.- H. Simon povis partopreni kiel reprezentantoj de nia TK.

En januaro 1987 estis eldonata en FI n-ro.15 la Meksikia manifesto de la 9a Forsta Mondkongreso, tradukita B. D. Marinov.

Komence de 1987ni ankaŭ povis anonci, ke prof. d-ro. H.- D. Quednau kaj J. A. Pachter estis aprobitaj kiel membroj de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), kiu uzas Esperanton kiel laborlingvo, iom pli malfrue B. D. Marinov estiĝis membro de Internacia Scienca Kolegio (ISK) de AIS. Kadre de IFER '87 kunvenis inter la 13a kaj 15a de marto J. A. Pachter, I. kaj K.- H. Simon kaj I. Ullrich en Leipzig. Krom intensa terminologia laboro ili ankaŭ preparis la ĉefan kunvenon de IFRE anoj dum la 72a UK en Varsovio.

Kadre de ampleksa inĝeniera organizaĵo de GDR, de la "Kammer der Technik" ("Ĉambro de Tekniko"), oni organizis en junio 1987 laŭ instigo de esperantistoj en la Instituto pri Forstosciencoj Eberswalde apartan faksekcion pri forstterminologio, destinita daŭrigi kaj firmigi la jam ekzistantan kunlaboradon de IFER anoj kun membroj de la Ĉambro.

4. La periodo de 1987-08-25 ĝis 1990-09-15

La Jubilean Kongreson en Varsovio inter la 25a de aŭgusto kaj la 1a de septembro partoprenis 12 IFRE anoj (A. Barasevich, M. Bulka, B. D. Marinov, K. Pacholczyk, S. Oroszi, U. Ribers, I. kaj K.- H. Simon, O. Váňa, J. Smildzinš, Z. Wolniarski kaj M. Markheden, intertempe IFRE ano). Krome ĉeestis dum unuopaj kunsidoj de forstistoj ankaŭ aliaj interesuloj. Kolegino V. Kovaleva surprizis nin per sendita fotomuntaĵo pri tiuj IFRE anoj, kiuj sendis al ŝi la petitajn fotojn. Sub la gvido de B. D. Marinov kelkaj kunsidoj okazis. K.- H. Simon raportis pri la historio de IFRE kaj la stadio de la terminologia laboro. Li substrekis, ke estas unu el la plej gravaj aferoj de nia agado, ke la esperantistoj pli kaj pli estiĝis perantoj de tiu ĉi internacia laboro. Ĉar preskaŭ ĉiu esperantistoj apogis sin sur pliaj kompetentuloj, nekonataj al la IFRE- centro, la nombro de kunlaborantoj nur povis esti taksita, certe superis kvindek. La reprezentantoj de 11 etnolingvanoj kunlaboris en tiu tempo. Al 25 IFREanoj estis senditaj en 1987 la FI- ekzempleroj. – Dum la UK tri pliaj interesuloj anoncis sin. – Rilate la terminologian laboron, nun estis eldonataj 700 nocioj kadre de la unua versio, 300 numeroj de la dua versio kaj la TK prilaboris 520 terminojn. Estis komunikita, ke pro transloĝiĝo de la adresulino en Eberswalde la subdistrikta sekretariejo de la Kulturligo de GDR estis komenciĝanta kiel adresulo.

D-ro Simon distingis la ĉeestantajn pionirojn de IFRE, B. D. Marinov kaj S. Oroszi per medalo, kiu estis kreita okaze de la 150a datreveno de la naskiĝtago de la forstscienco en Eberswalde. – La aliaj pioniroj A. Barasevich, O. Berger, V. Kovaleva, L. Landmann, S. Maserov, J. Moudry, J. A. Pachter, U. Steinert, I. Ullrich, O. Vana kaj d-ro Weckwerth ricevis la medalon post la kongreso. – S-ro Medvedev, Moskva, proponis, ke la malmultaj forstistoj kuniĝu/aliĝu al la ekoloĝoj. La ĉeestintoj ne konsentis, ĉar IFRE ĝis nun sukcese laboris. La IFREanoj aprobis rekomendon de la kunveno:

1. la terminologia kaj vortara laboroj sur bazo de slipoj, preparataj en Eberswalde sukcese paŝas antaŭen kaj daŭru, celante prepari la unuan parton de multlingva fakvortaro A ĝis Z kun ĉ. mil nocioj.
2. Ĉiuj IFREanoj partoprenu en la ellaborado de Esperanto- lingvaj artikoloj,

tradukoj kaj prelegoj por la Forstista Informilo, aliaj revuoj kaj fakaj kunvenoj. La aplikado de Esperanto en la forstscienca literaturo pligrandiĝu.

3. La ĝisnuna laboro de IFRE, gvidita de la s-anoj d-ro Simon, Marinov, Pachter kaj Ullrich dauriĝu sub tiu ĉi estraro.
4. S-ano d-ro Simon reprezentu la aferojn de IFRE en la Terminologia Esperanto-Centro de UEA.

Je la 25a de julio la estraro de UEA aprobis la fondon de Terminologia Esperanto-Centro (TEC). Dum la unua kunveno la 27an de julio la Estraro nomis la membrojn de la Komitato i. a. d-ron Simon kiel reprezentanto de IFRE.

Pri la kvinjara forstfaka laboro de esperantistoj J. A. Pachter donis intervjuon al la svisa radiostacio MUNOT. Estas ankaŭ interese, ke la artikolo "Pri acidiĝo en Skandinavio" de I. Ullrich kaj J. A. Pachter estis presita - laŭ permeso de la aŭtoro - en Esp.-revuo en Seoul kaj en la revuo "Tutmonda Scienco kaj Tekniko". Dum la IFER '88 (1988-03-11/13) konsiliĝis I. kaj K.- H. Simon kun J. A. Pachter pri la realigo de nia varsovia rekomendo. K. Pacholczyk proponis letere, ke la forstistoj-esperantistoj pripensu propran saluton kaj propran insignon, kaj li mem faris konvenajn proponojn.

La klopodoj rilate kontaktojn kun rumanaj forstistoj-esperantistoj rezultis en la preteco de s-ano I. SÎRBU el Brasov, Rumanio, agadi kiel peranto al forstistoj kaj tiel apogi la vortaran laboron.

Je la 4a de aŭgusto 1988 K.- H. Simon prelegis dum la AEST '88- aranĝo en Poprad, ĈSSR, "Pri la raciigo de terminologia kaj vortara laboroj". La sekvinta diskuto pruvis la vastan intereson de aliaj esperantistoj, kiuj ankaŭ antaŭenpuŝas la terminologian laboron.

Dum la Jarneza Esperantista Semajnfino (JES '89) en Leipzig (GDR) anoj de IFRE povis prezenti sin antaŭ pli granda publiko. JES okazis kadre de la fama agrikultura "agra". Je la 25a de junio 1989 prelegis I. Ullrich pri "La arbara fonduso en GDR" kaj K.- H. Simon "Ĉu la laiko povas helpi por vivteni la arbaron?". Tie ni povis disvastigi ekzemplerojn de du afiŝoj "Fakvortaro pri Forstmastrumado" kaj "Skemo de la labor-sistemo" pri nia terminologia laboro. Okaze de JES la anoj de IFRE- estraro - K.- H. Simon, B. D. Marinov, kaj I. Ullrich - povis diskuti la proponon pri klasifikado de forstaj nocioj (vd. FI n-ro. 20, aldono n-ro 4). Tiu propono baziĝas sur la "Oksford-sistemo de la decimala klasifiko pri forsta fako". Dum la sekvinta tempo I. Ullrich tradukis la Oksford-Sistemon ĝis la kvara cifero, kiel ĝi estas uzata en nia terminologia laboro. En tiu ĉi laboro nun partoprenis kiel responsuloj de etnolingvoj la sinjoroj ne-esperantistaj prof. BØRSET, Norvegio, prof. DINARD, Francio, d-ro. YILDIRIM, Turkio, Inĝ GRARIOS, Kubo, kaj Inĝ BLAŠKO, Slovakio.

En aŭtuno 1989 la laborkondiĉoj de esperantistoj en la ĝis tiam socialismaj landoj fundamente ŝanĝiĝis. La restriktaj rilate vojaĝojn en nesocialismajn landojn kaj senperajn kontaktojn kun tieaj esperantistoj malaperis. Sed malaperis ankaŭ la financaj subtenoj, kiuj estis ordinaraj en kelkaj landoj. Pli ol antaŭe estis postulata la persona engaĝiĝo de esperantistoj.

Post kiam fine de la jaro 1989 estis eldonitaj la dua versio de mil nocioj, la TK koncentriĝis sur la elprovon de la nocio-proponoj kadre de la tuta sistemo de forstfakaj nocioj kaj kadre de unuopaj vortfamilioj, vorto "cluster". Aliflanke estis necese kompletigi la ekvivalentojn en la diversaj lingvoj kaj varbi pliajn kunlaborantojn.

En FI n-ro. 21 proponis J. A. Pachter ĉefkunvenon de la IFREanoj en Białystok, en septembro 1990 dum la Sennacieca Universitata Sesio (SUS) de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). Tie estus ebleco fakte kunveni kaj labori. Pri tiu ĉi afero la IFRE- estraranoj J. A. Pachter, K.- H. Simon kaj I. Ullrich konsiliĝis speciale dum kunveno je la 9a de aprilo 1990 en Hildburghausen, GDR. Por firmigi la

IFRE- organizaĵon kaj evoluigi la kunlaboradon kun kunvenaj partneroj la estraro komisiis s- anon J. A. Pachter ellabori proponojn pri statuto de IFRE kaj kontrakton kun AIS, kaj s- anon K. H. Simon prepari la kronikon de IFRE.

La kontaktoj kun membroj de la IUFRO- fakgrupo 6.03 "Information systems and terminology" rezultis en raporto de d-ro Schrader dum IUFRE- kongreso en Montreal 1990 pri la terminologia laboro de IFRE.

fake kaj lingve reviziis: Ingward Ullrich